

Pierre Denjean,
La kanto de la Baseno

tradukita de N. N. 64

1. Ĉu estas lokoj pli ĉarmaj sur la tero
Ol la bordoj de nia bela Baseno?
Ravaj lokoj, kie tie, oni povas nur kontenti,
Dolĉa klimato, friska vento, tre pura aero.
Nia baseno estas la mirindaĵo
Pri kiu ĵaluzas tiom da landoj.
en multaj koroj, ĝia nomo vekas,
Eĥon teneran, eĥon tra dolĉan!
Guĵan-Mestras, Le Teŝ, Lantono, L'Herb', Andernos,
La Test, Aŭdenj', Tosat' kaj Biganosa

Rekantaĵo

Jes! La Baseno estas unika en la mondo.
Vidante ĝin, siajn affliktojn oni forgesas.
Kia feliĉo, kiam oni glitas sur la ondoj
Kantante tiun gajan rekanaĵon!
Ni spiraa puran aeron, kiu nin ebriigas,
Kaj kiam sur la akvo, gajaj, ni navigas,
Ni komprenas kion la venteto kantas.
Kia juvelo, la Baseno de Arkaŝono!

2. Ni aŭdas ofte la la oceanon bruantan;
Tiom danĝera nia Baseno ne estas!
Do, aŭskultante la murmuron de ĝiaj ondoj
Ĝi estas lulanta, harmonia kiel dolĉa kanto.
Dufoje tage la tajdo altiĝas
Rekovrante la ostrejon per siaj akvoj.
La ondoj sendube rakontas
fabulojn en siaj ploregoj.
Le ĵake, le Kanon, Pirajan, Pike, Mulo,
Fere, Pila, Arkaŝon' kaj Klaŭe.

Rekantaĵo

Jes! La Baseno estas unika en la mondo.
Vidante ĝin, siajn affliktojn oni forgesas.
Kia feliĉo, kiam oni glitas sur la ondoj
Kantante tiun gajan rekanaĵon!
Ni spiraa puran aeron, kiu nin ebriigas,
Kaj kiam sur la akvo, gajaj, ni navigas,
Ni komprenas kion la venteto kantas.
Kia juvelo, la Baseno de Arkaŝono!

...

3. Sur la Baseno, la fervoruloj de la boatado
 Multnombre venas navigi somere.
 Fiŝkaptado, jaĥttado kaj ĉiuj plaĝosporto
 Sunbrunigas la korpon kaj fortigas la sanon.
 Gustumu do niajn sanajn ostrojn
 kun bona blanka vino.
 Kaj vi havos nenian malfacilon
 Por vivi ĉiuj ĝis cent jaroj!
 Kaj kiam oni gustumis la fiŝosupon,
 Oni ne povas forgesi la Basenon de Arkaŝon'!

Rekantaĵo

Jes! La Baseno estas unika en la mondo.
 Vidante ĝin, siajn afliktojn oni forgesas.
 Kia feliĉo, kiam oni glitas sur la ondoj
 Kantante tiun gajan rekanaĵon!
 Ni spiraa puran aeron, kiu nin ebriigas,
 Kaj kiam sur la akvo, gajaj, ni navigas,
 Ni komprenas kion la venteto kantas.
 Kia juvelo, la Baseno de Arkaŝono!

*Traduko de la franca poemo "La Chanson du Bassin" de PIERRE DENJEAN (*1920 – †1957) en Esperanton de N. N. 64.*

Arg-895-1781 (2013-05-29 15:11:52)

La origina franca teksto troviĝas en http://www.arcachon-guide.fr/manifestation/la_chanson_du_bassin.html. La kanton oni povas audi en <http://www.youtube.com/watch?v=lm4tViuVoJM> kaj en <http://www.youtube.com/watch?v=Pq8Kc93p2Pc>.